N I A   V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
lunde vespere (91) 5 30 87 98 * fax (91) 5 71 08 52
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz NOVEMBRO 1994

# MEL TRE DANKAS AL VENEZUELO AMBASADO KIU PRUNTEDONIS MIRINDAJN LUMBILDOJN DE TIU ĈI BELA LANDO POR LA PRELEGO DE Luis Ojer

**MALAGA KONGRESO**
Inter la konkludoj de la Malaga kongreso estis enkomputiligi kontojn de HEF. La laboron faras Pedro Garrote (nova vic-sekretario de HEF) kiu havas eksperton ĉe la Liceo en la programo de Caja Madrid

**KAMAĈO DENOVE**
Georgo estas ofte novaĵo pro tio iu sugestis meti en Nia Voĉo "Kamaĉa angulo". Tiun-ĉi monaton nia akademiano aperas kiel gajninto de la dua kaj tria premio en la Belartaj Konkursoj. Proza sekcio: Verkoj "Avataro" kaj "Gulivero en _apelujo"

**ESPERANTO EN TV**
La kataluna televida felietono "Poble Nou" jam kvarĉapitre menciis esperanton: e-isto tradukis por amika familio trezore gardata avan leteron kun plezuro, ĉar "oni havas malmultajn okazojn praktiki esperanton" ("Esperanto" Julio 1994)

**HEF ANGULO a_ MEL sugestas** (Ne oficiala)
En januaro komenciĝos baza kurso de Esperanto ĉe HEF-CO, bv. propagandi inter viaj konatuloj. Informoj: marde kaj ĵaŭde vespere 446 80 79

Juan Carlos Ruiz, laboras por HEF rilate serĉi profiton de ĝia publika utileco (PU). Li intervjuis al respondeculo de la Ministerio pri Internaj Aferoj. Ampleksa informo aperos en venonta numero de "Boletín"

Sugesto al hispanaj esperantaj grupoj: Sendu viajn projektojn pri prelegoj, renkontiĝoj, ekspozicioj, eldonado de libroj ktp. por studi ĉe HEF la eblecon de petado de subvenciojn profitante PU-n.

**KONGRESOJ**

- 15a-22a oktobro. 2-an Internacian Kulturan kaj Turisman Esperanto-Semajnon. Centro Borja. Sant Cugat del Vallés. Informoj: Kultura Sekcio de Hispana Esperanto-Muzeo. Poŝtkesto 15027-08080 Barcelono.
- 29-a oktobro ĝis 1-an novembro. "Babele babili" Kataluna Esperanto Junularo. Sant Celoní (Vallés Oriental)
- 10a ĝis 13a de novembro. En Troia, apud Lisbono, "Dua Atlantika Plonĝado". Prelegos Gonçalo Neves. Portugala Esperanto Junularo, Rua Dr.J.Couto 6 r/c A,P-1500 Lisbono
- 2-a ĝis 6-a de junio (1995). En Parizo okazos la "Dua Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. UFE, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio
- 11-18-a de februaro "Skisemajno en Altaj Tatroj" en Poprad kie loĝas Augusto Casquero. 7 tagoj 70 $. ESPERANTO. Sobotské námestie. 058 01 Poprad Slovakio.



**ESPERANTO ĈE EŬROPA KONSILANTARO**

Tiu-ĉi internacia organizo, kreita en 1949, kies celo estas kunigi kaj defendi kulturajn europajn valorojn havas, ekde aprilo 1994, Ĝeneralan Sekretarion kiu parolas esperanton. Temas pri la sveda Daniel Tarchys. ("Fido kaj Espero")

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. _is la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliajn tagojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79

En Centro Cultural "Maestro Alonso" (Ventas) merkrede je la 18.30h. okazas baza kurso de esperanto. ĝin gvidas Antonio kaj Rafael.

14-a novembro. Prelego ĉe MEL de C. Suárez "Malsupreniĝi maŭren"
decembro. Zamenhofa bankedo.

**"HEROLDO" PREMIATA**

La germana Fondaĵo "FAME" asignis al "Heroldo de Esperanto" kaj al la verkistino Spomeca Stimec la kultur-premion 1994 pro ilia ilia kontribuo al la disvastigado de kulturaj verkoj kaj subteno de internacia kompreniĝo.

Ankaŭ la redaktorino de HdE, Ada Fighiera-Sikorska, estis omaĝita, en la UK de Koreio. UEA nomis ŝin "Honora Membro". Gratulon Ada!!

**SKRIBU KOMPUTILE:** Á É Í Ó Ú □ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Eksistas diversaj klavaroj por skribi supersignajn literojn en WP sed ĉiuj konataj de la redakcio de "Nia Voĉo" nur validas por skribi en esperanto kaj ne estas utilaj por akcenti majusklajn literojn en hispana lingvo (laŭ la reguloj de la Hispana Akademio estas devige akcenti ilin). Por skribi korekte hispane vi devas ŝanĝi la klavaron. Se vi preferas uzi la saman klavaron vi povas ricevi kopion de la kreita ĉe MEL kontraŭ diskedon kaj 10 poŝtmarkojn po 18 PTA

**VERDA STELO**

La koruso "Verda stelo" kiun gvidas Juan Jesús Garcia kantis en la meso kiu festis "El Pilar" en la kvartalo Salamanca. La urbestro partoprenis en la akto (*Li ne kantis kompreneble nur aŭskultis*).

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4º
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal